

BELGA ESPERANTISTO

48a Jaro — N-ro 1a — Januaro 1956a

Fondita
en 1908a



Redaktoro-Administranto:
la Prezidanto de R.B.L.E.:

Maur. JAUMOTTE

Avenuo De Bruyn, 44
Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de

REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

Asocio sen profita celo,

aliganta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Abonprezo:
Fr. 100,-

Ce l' Jarrenovigo

Ni ĵus eniris novan jaron. Antaŭ kelkaj tagoj, ĉie en la mondo, la Esperantistoj kunvenis iom pli solene ol kutime, okaze de la Zamenhoftago.

Kaj en multaj lokoj, oni per paroladoj, deklamadoj kaj kantoj revokis antaŭ ĉies spirito tiujn unuajn jarojn de nia movado, kiam nia Majstro staris ankoraŭ preskaŭ sola kaj tamen sukcesis antaŭenpuŝi la ideon pri universala lingvo, tiel senlace kaj forte ke, post malmultaj jaroj, ekfloris tiu bela movado, al kiu ni fieras aparteni.

Sed post tiu realvoko al estintaj tempoj, ni ja, — ĉe l'eniro de tiu ĉi nova jaro —, ankaŭ povas kaj devas pripensi la estonton.

La antaŭaj du jaroj, — kun Montevideo kaj Strasburgo, kie en UNESKO kaj en EUROPA ASAMBLEO, la plej eminentaj diplomatoj devis atentigi la problemon de universala lingvo kaj, pli speciale, la solvon kiun Esperanto proponas —, alportis al ni novan esperon.

Kaj, se ni kuraĝas ankoraŭ iom akcenti niajn penadojn, precipe ĉe la oficialaj instancoj kaj streĉadi niajn fortojn por ke tiuj paŝoj, ĝenerale farotaj de la gvidantaj instancoj de nia movado, estu apogataj per tre larĝa florado de nia ordinara propaganda laboro, ni rajtas esperi, ke niaj penadoj povos baldaŭ eniri novan vojon, tiun de la oficialeco kaj de la oficialigo.

Sed ni pripensu ke, — en tiu momento, — ni devos esti pretaj por respondi al eventualaj alvokoj, kiujn al ni faros tiuj oficialuloj, kiujn ni, ĝis

nun, ĉiam mem klopodis alvoki, ofte iom vane.

Tial ni, — jam ekde nun —, pretigu ĉiujn niajn fortojn, la efektivajn kaj la rezervajn, kiel oni diras en granda armeo antaŭ la fina batalo, kiu ankaŭ al ni devos alporti la finan venkon de paco kaj frateco.

Maur. Jaumotte.

**REGA
BELGA LIGO
ESPERANTISTA**

kaj ĝia organo

„BELGA ESPERANTISTO“

prezentas siajn plej korajn bondezirojn por la nova jaro.

Historiaj Notoj pri Kopenhago

De kiam la unuaj kopenhaganoj paŝis en siaj infanaj ŝuoj (nemalmulte da akvo fluus en „Gammel Strand“) almenaŭ 7-8000 jaroj pasis.

Kiam tiuj „kopenhaganoj“ staris ĉe siaj modestaj loĝlokoj proksime de la nuna Højbro kaj rigardis trans la larĝan markolon al Amager, ili certe gratus sin en la barbo, se ili imagus nur iomete de tio al kio la tuta afero

evoluiĝis ĝis hodiaŭ. Tamen, se ni, la nun vivantaj, rerigardas al tiuj de longe pasintaj tempoj, ni same malbone vidas, ĉar tre malmulte oni scias pri la plej malnova historio de Kopenhago.

Nur longe, interne de la historia tempo ni povas legi en la informoj de Saxo Gramaticus, ke la episkopo Absalon en la jaro 1167 malhelpis norvegan eskadron alboriĝi ĉe „tiu urbo, kiu nomiĝas Køpmannæhafn.“ Kaj en la intenco forteli marrabistojn, la sama Absalon — en 1171 — fondis fortan kastelon tie ĉi, kun klara antaŭvido, sur strategie bonega loko, kaj meze de la lando. Ke la urbo iom malorde nun situas en angulo de la lando, tio ja estas alia historio, kiel H.C. Andersen diras!

La urbo kreskis ŝirmate de la kastelo, konstante kaj obstine — ĉar obstineco estis necesa, kiam ĝi fojon post fojo estis detruata kaj elrabita, jen de eksteraj malamikoj, jen en la eterna batalo inter reĝo kaj episkopo. Sian unuan urborajton ĝi ricevis en 1254 de la episkopo en Roskilde, Jacob Erlandsen kaj fine en 1443 Kristoffer el Bavarujo faris ĝin reĝa restada urbo.

Ni devas rapide paŝi trans la multajn eventojn, kiuj dum la venontaj jarcentoj donis al la urbo sian stampo, eventoj bonaj kaj malbonaj. Tamen estu menciite, kiel la kopenhaganoj ĝis la amara fino subtenis Kristian la 2-an, kiam samtempe la gran-

Manjo

(Mietje)

GUIDO GEZELLE (1830-1899)

Manjo, svelta grentrunket',
nudpiede, trete,
lakton portas en nelvet',
dolĉe, dolĉ-dolĉete,
atentante nur pri l'trakt',
tre singarde, de la lakt'.

„Manjo“, aŭdis la knabin',
„bonan tagon“, ne divenis
kiu dolĉ-parolis ŝin
kaj kapturnis kaj ĉagrenis:
falas lakt' sur nudpied',
kiu vokis...jen sekret'!

Manjo, vigla Manjo, se
lakton nudpiede
portas vi, atentu tre:
dolĉe, dolĉ-dolĉete
se vi ion aŭdas, nu
ne kapturnu tiam plu!

trad. H. Vermuyten

LA KOTIZREPAGO

Novjaro estas la tempo de la kotizrepagoj.

En la BELGA KRONIKO oni trovas la poŝtĉeknumerojn de la Grupoj kaj de la Ligo. Oni uzu ilin tuj!

La proksima numero estos sendata nur al la repagintoj.

(Daŭrigo paĝo 2)

Rigardo al la Pasinteco

Post kelkaj jaroj ni povos festi la centan datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof kaj en la nuna jaro jam pasis 69 jaroj post la eldono de la unua broŝuro pri la internacia lingvo Esperanto. Tio estas por ni motivo por rigardi al la pasinteco kaj transvidi la vojon iritan. Alia motivo por tiu rerigardo estas la fakto ke hazarde venis en niajn manojn libron, eldonitan en la jaro 1912, verkitan de la franca lingvisto A. Dauzat kaj kies titolo estas „La défense de la langue française”. (la defendo de la franca lingvo). Tria motivo estas ke ĝuste de tempo al tempo rerigardo al la pasinteco donas al ni pli bonan komprenon pri la nuna tempo kaj ofte povas esti kuraĝiga por la estonteco.

Kiel ni jam diris la nomita libro estas eldonita en la jaro 1912 t.e. en la tempo, kiam nia movado kaj lingvo havis en Francujo siajn fervorajn adeptojn, sed estis ankaŭ la tempo, kiam nia movado spertis la malbonajn sekvojn de la skismo rilate al Ido. Ne mirige estas tial, ke la verkisto uzas ĉi tiun okazon por kontraŭbatali la ideon pri internacia lingvo ĝenerale kaj speciale la „artefaritaĵn” lingvojn Esperanto, Ido kaj aliajn. La aŭtoro vidas en tiuj lingvoj danĝeron por la franca lingvo rilate al ties pozicio sur internacia tereno.

Forte li bedaŭras, ke la franca lingvo, kiu en la 18a jarcento estis la ĉefa lingvo de la diplomatoj kaj de multaj plialtrunguloj jam perdis multon de sia influo en tiuj rondoj pro tio, ke la naciismo ĉie en la mondo faris progresojn.

Kiam en la unua tempo aperis la

Dauzigo de paĝo 1

daj luktoj inter la katolikismo kaj la instruado de Luther furiozis; same pri la konstruado de Kristian la 4-a, kiu faris Kopenhagon — laŭ la mezurilo de tiu tempo —, grandurbo, konstruado, kiu ĉe hodiaŭ donas al la ĉefurbo sian stampon. Tamen, el ĉiuj eventoj en la historio de la urbo estas unu, kiu tute prave povas esti nomata la sorthoro. Jes, vi jam divenis, temas pri la jaro 1659, la nokto inter la 10-a kaj 11-a de februaro.

Kaj tiam ŝanĝiĝis en la sekvantaj jarcentoj lumo kun ombro, ĝojo kaj malĝojo, renesanco, baroko, Griffenfeldt, Holberg, rokoko, klasicismismo, la bombardado de Kopenhago, la Libereco Kolono, Biedemejer, la orkonoj, la malkonstruo de la remparoj, naturalismo, la forbrulo de la palaco Kristiansborg, funkcionalismo, kubismo, la kvin malbenitaj jaroj kaj la fino de la porciunigo de kafo!!

Sur tiu fono, karaj gastoj, vi ekkonu kaj sentu Kopenhagon!

A. Holst.

projektoj de internacia lingvo por ĉiuj homoj, diras S-ro Dauzat, la granda publiko restis tute indiferenta al tiu problemo konsiderante la interesigantojn kiel utopistojn. Sed post kiam inter tiuj interesigantoj troviĝis profesoroj, scienculoj, membroj de la franca akademio, kiuj faras propagandon favore al Esperanto aŭ Ido, la afero ŝanĝiĝas kaj meritis esti studata. Ĉar tiuj kiam lingvo internacia ŝajnas esti ebla, estigas alia problemoj pri kiu oni ĝis nun ne pensis. La sukceso de internacia lingvo endanĝerigas la pozicion de la franca lingvo en la eksternlando tiel pene akiritan kaj tiel pene defenditan — same kiel tiun de ĉiuj lingvoj naciaj parolataj ekster ĝiaj propraj limoj.

Jen la unua motivo de S-ro Dauzat esti kontraŭulo de kiu ajn lingvo internacia kaj kiam post la mondekspozicio en 1900 en Parizo, estiĝis periodo de entuziasmo por la ideo de lingvo internacia, estis akvo al la mulilo de S-ro Dauzat, ke fondiĝis la Delegacio por la elekto de lingvo internacia kun la sekvo, ke estiĝis la konata skismo inter Esperanto kaj Ido.

Komenciĝis forta batalo inter la adeptoj de ambaŭ lingvoj kaj S-ro Dauzat jam antaŭdiras, ke tio finfine kondukos al plena fiasko, ĉar ĉiam denove estiĝos disputoj kaj kvereloj inter la adeptoj de diversaj interlingvaj projektoj.

Sed tio ne estas ĉio. La verkisto de la nomita libro havas ankaŭ kritikon pri la lingvo mem.

Pri la vortaro li diras, ke komence la lingvo havis proksimume 925 vortojn inkluzive la finaĵojn kaj la afiksaĵojn. Sed baldaŭ montriĝis, ke tiu nombro ne estis sufiĉa kaj Zamenhof mem pligrandigis ĝin ĝis 2.645 vortoj. Tiu pligrandigo de la vortaro ne estos haltigebla, ĉar ekzistas neniu baro, neniu homa volo povos bremsi la evoluon de lingvo de la momento, kiam ĝi vivas, estas parolata kaj skribata kaj forlasis la studkambron de sia kreinto. Jen grava kaŭzo, ke estiĝas diferencoj en la vortaro ĉar ne ĉiam kaj ne ĉiu aplikas la ĝustajn regulojn de la vortfarado, kio rapide povas konduki al disfalo de la lingvo.

Sed ne nur la vortfaradon kritikis S-ro Dauzat, ankaŭ la gramatikon kaj la prononcadon. La tabelo de la korrelativoj, laŭ S-ro Dauzat, estas tre malfacile lernebla. La akuzativo estas ĝena, ĉar multaj popoloj ne konas ĝin kaj tial ĝi kaŭzas ofte malfacilaĵojn.

Tiel, ni povus ankoraŭ longe daŭrigi la kritikojn de S-ro Dauzat, sed la legantoj jam komprenas, ke ĉio, kion la aŭtoro diras, celas nur subfosi la pozicion, kiun Esperanto tiutempe jam akiris kaj ankaŭ la ideon pri neŭtrala lingvo internacia ĝenerale.

Laŭ lia ideo, la solvo de la lingvaj problemoj ne kuŝas en la kreo de unu sola lingvo internacia, sed en alianco de tri naturaj lingvoj: la angla, germana kaj franca, kaj fakte en tiu alianco la franca lingvo devus ludi la plej gravan rolon aŭ almenaŭ franca-angla alianco kaj jen ni alvenas al la franca-angla bilingvismo, kiu ankaŭ nun antaŭ kelka tempo denove donis vivsignon, sed kun malmulte da sukceso, kiel oni scias.

Ni nun turnu la rigardon al la estanteco kaj ni povas konstati kiom restis, post iom pli ol 40 jaroj, el la diraĵoj de S-ro Dauzat.

Esperanto travivis la skismon kun Ido, du mondmilitojn kun ties mizeraj sekvoj, enpenetris en la plej altajn instancojn internaciajn, la esperanta literaturo ampleksas gravajn verkojn el la mondliteraturo.

Esperanto estas nun instruata en diversaj lernejoj en la tuta mondo.

Esperanto povas ĉiutage esti aŭskultata en radio-elsendoj.

Esperanto-Kongresoj universalaj altiras tiom da personoj el la tuta mondo, ke ofte la L.K.K. devas limigi la nombron de partoprenantoj.

Esperanto ne estas endanĝerigita pro disfalo en dialektoj, kontraŭe pro la ĉiujaraj kongresoj universalaj la prononcado fariĝis pli kaj pli la sama de ĉiuj esperantistoj en la tuta mondo.

Jen la pruvo, kiu tute klare kaj konvinke montras kiel la evoluo de nia movado malpravigis la tezojn kaj kritikojn de S-ro Dauzat.

Tiu malpravigo samtempe donas al ni kuraĝigajn perspektivojn por la estonteco! Vere la atingoj akiritaj en la daŭro de nur 40 jaroj promesas al ni la finan venkon, se ni nur per streĉiĝo de ĉies fortoj en komuna laboro daŭrigas niajn klopodojn.

Multaj samideanoj forlasis en la daŭro de tiu sama tempospaco niajn vicajn pro tio, ke ili perdis la kuraĝon kaj sentis sin seniluziigitaj pro la ŝajna malrapida progreso de nia afero sed ankaŭ ili vere malpravvis. Ili ne sufiĉe konsciis, ke la enkonduko de internacia lingvo ne povas okazi en mallonga tempo sed estas laboro de longa spiro, kiu postulas persiston, paciencon kaj daŭran entuziasmon por nia idealo.

Transvidante la vojon iritan dum nur ĉ. 40 jaroj ni kun granda ĝojo povas konstati, ke la progreso de nia movado superas ĉiujn atendojn. Ĉu tio ne donas kuraĝon por la estonteco? Ĉu tio ne povas ekflamigi ĉies entuziasmon? Ĉu tio ne instigos ĉiujn kunbatalantojn al pli da fervoro, al pli da aktiveco, al pli oferemo por la grandioza celo?

Ni lasas la respondon al niaj legantoj!! Ni fosu nian sulkon!

F. W.

„VENDITA FIANĈINO”

en Esperanto sur gramofondiskoj.

Esperantista Societo en Olomouc (Ĉeĥoslovakio) instigis eminentan tenoron Zdenek Švehla, ke li kantu operariojn esperantlingve sur gramafondiskoj.

Kiam la sekretario de Tutŝtata Konsulta Kolegio Esperantista, Sano Miloš Rudolf, vizitis s-ro Švehla por demandi lin, ĉu li volus kanti operariojn en Esperanta traduko, la fama tenoro deklaris, ke li tre aprobas la ideon sed ke, antaŭ ol preni sur sin tiun taskon, li lernos Esperanton por bone kompreni la esperantajn vortojn kaj ankaŭ pro tio, ĉar li mem havas intereson posedi la internacian lingvon.

Post du monatoj li jam bone parolis Esperanton kaj komencis studi la tekstojn. Kunlaboras kun li du aliaj solistoj, Sino Královcová kaj S-ro Tesar, kiuj estas membroj de la Esperantista Societo, kaj kunlabore kun spertuloj ili preparas la plej belajn ariojn kaj duetojn el la opero „Vendita Fianĉino” de Bedrich Smetana. Ankaŭ s-ro Švehla aliĝis al la Esperantista Societo.

La diskoj verŝajne estos pretaj en januaro 1956. Tiam do oni povos aŭskulti klasikan ĉeĥan muzikon el opero, kies teksto estas tradukita en Esperanton, ankaŭ en tiuj mondregionoj, kie pro lingvaj baroj tiu ĝuo ĝis nun ne estis ebla.

S-ro Švehla esperas partopreni la 41-an Universalan Kongreson de Esperanto en Kopenhago, al kiu anoncis sin jam pluraj ĉeĥoj, kaj li preparas kelkajn famajn tenor-ariojn el mondkonataj operoj por la Arta Vespereo dumkongresa.

(Laŭ Heroldo 1.12.55 iom mallongigita).

Raporto pri la karuselvojaĝo 1955

Konvinkite, ke Esperanto povas nur evolui sur internacia kampo, mi planis la karuselvojaĝon. Miaopinie ĝi devus okazi sub aŭspicio de U.E.A., pro kio mi sendis proponon cirkuleron al ĉiuj U.E.A.-komitatanoj. Respondis favore roj Gindertaelen, Strönnne, Maruzzi, Lapenna kaj Mabesoone. La aliaj ne sendis respondon. S-ro Malmgren opiniis, ke la unua provo ne estu farata de U.E.A., por ke ĉe malsukceso ĝia nomo ne estu endanĝerigita.

Dank’ al la helpo de LEEN, la belga asocioj kaj GEA la unua karuselvojaĝo estis aranĝata.

LEEN donis la monan subtenon kaj diskonigis ĝin per sia organo. La belga kaj germana asocioj nur diskonigis ĝin per sia gazeto.

Krome aperis malgrandaj anoncoj en ESPERANTO (2 x) LA PRAKTI-

41-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

KOPENHAGO - (DANLANDO)

4 aŭgusto - 11 aŭgusto 1956

N-ro 2 OFICIALA KOMUNIKO Decembro 1955

ADRESO: 41-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danlando

BANKO: Handelsbanken, Kopenhago, Danlando.

POSTGIRKONTO: 41-a Universala Kongreso de Esperanto, n-ro 97820, Kopenhago, Danlando.

ALIGOJ: Oni povas aliĝi per la oficialaj perantoj aŭ rekte ĉe la 41-a Universala Kongreso, Kopenhago. Oni sendu la pagon al sama instanco, al kiu oni sendas la aliĝilon. Aliĝo kaj pago okazu samtempe. Ek de la 1-a de januaro la kotizo estos danaj kronoj 43,—, edzino 21,50. gejunuloj 14,50, studentoj 21,50. Individuaj membroj de UEA rajtas rabaton 7,—, edzino de kongresano 3,50.

KARAVANOJ: Ĝis nun la jenaj Landaj Asocioj anoncis karavanojn: Franca Esperantista Unuiĝo, 34 rue de Chabrol, Paris 10, Francujo. Germana Esperanto-Asocio, Bergisch-Glad, Bacherstr. 1095, (22c), Köln-Dellbrück, Germanujo. Itala Esperanto-Federacio, Casella Postale 248, Torino, Italujo.

FAKAJ KUNVENOJ: Ĝis nun anoncis fakkunvenon la jenaj asocioj: Internacia Komisiono „Esperanto kaj Sociologio”, Moerweg 76, Den Haag, Nederlando.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, 183 Woodlands Park Road, Bournville, Birmingham 30, Anglujo. Studenta Esperanto-Klubo, Mariendalsvej 39, Kopenhago, Danlando.

KONGRESA GLUMARKO: Ĝi estas acetebila ĉe Landaj Asocioj aŭ rekte ĉe la 41-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danl.

INFANA KONGRESETO: Povas partopreni Esperanto-parolantaj infanoj de 6 ĝis 13 jaroj. La infanoj loĝas, manĝas kaj estas okupataj en la infangardeno „La Ludocambro”. Aparta programo aperos kaj estos sendata al interesigantoj. Aliĝo al U.K. estas deviga. Prezo por la restado (7 tagojn) danaj kr. 70,—. Tiu sumo estu pagata plej malfrue 30/6 - 1956. Limdato por aliĝo kiel por U.K.

KONGRESEJO: La Teknika Universitato en Kopenhago estos Kongresejo de la 41-a Universala Kongreso.

INAUGURO: Ĝi okazos en la nova koncertsalono en la mondkonata parko „Tivoli”. La konstruaĵo estos la plej moderna el la tuta Skandinavio.

STATISTIKO: (ĝis fino de novembro) Anglujo 22, Aŭstralujo 1, Aŭstrujo 2, Belgujo 2, Brazilo 3, Danlando 58, Finnlando 6, Francujo 29, Germanujo 18, Hispanujo 6, Islando 1, Italujo 37, Kanado 2, Jugoslavujo 30, Nederlando 13, Norvegujo 15, Nov-Zelando 1, Svedujo 31, Svisujo 7, Usono 4. Sumo: 288 el 20 landoj (pasintjare 213 el 20 landoj).

Gian Carlo Fighiera

Konstanta Kongresa Sekretario

KO (2 x) kaj HEROLDO (3 x). La efiko estis, ke 48 personoj el diversaj landoj petis alsendon de prospekto, por kiu s-ro Nanning de Vries verkis senpage la desegnaĵon por la kovrilo. S-ro Leslie, London, petis alsendon de 100 ekzempleroj por distribuo inter la anoj de B.E.A. S-ro Leslie kaj edzino anoncis sin, sed pro familio-cirkonstanco devis nuligi la mendon. Mi sendis ankoraŭ cirkuleron al ĉiuj Esperanto-grupoj en Nederlando, Belgujo kaj Germanujo por diskonigo

de la vojaĝo ekster la esperantistaro. Neniu grupo respondis, ĉu ĝi jes aŭ ne plenumis la sugeston. La efiko de la karuselvojaĝo do estas negativa. Miaopinie ekzistas por tio la jenaj kaŭzoj: la prezo estas tro alta — la diskonigo okazis tro malfrue — la diskonigo ne estis sufiĉe intensiva — la afero estas io tute nova. Malgraŭ ĉio mi kredas, ke valoras la penon pri diskuti la eblecon por fari duan provon.

Hans Bakker.

BELGA KRONIKO

Prezidanto: S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44, Wiirijk.
Vicprezidanto-Kasisto: S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.
Vicprezidentino: S-ino J. Plyson, 185, rue Jourdan, Bruselo.
Generala Sekretario: S-ro H. Sielens, „Internacia Marista Domo“, Falconrui, 21, Antverpeno.
(Poŝtĉeknumero: R.B.L.E.: 13.37.67)

Kondolencoj

La prezidanto de nia Ligo kaj S-ino Marg. Jaumotte-Loquet estas trafita per la morto, en sia 90a jaro, de sia bopatrino kaj patrino S-ino Paula LOQUET.

Ne estas senditaj sciigiloj kaj tiu ĉi informilo anstataŭas ilin.

Ni prezentas al G-roj Maur. Jaumotte niajn plej sincerajn kondolencojn okaze de la funebro, kiu ilin trafis.

ANTVERPENO

Esperanto-Grupo „La Verda Stelo“
(Poŝtĉeknumero: 726.54)

La 28an de oktobro okazis la unua kabareta vespero de la sezono. Sekvanta kunlaborantoj ricevis la laŭdojn de la Prezidanto: F-ino M. kaj J. Ameryckx, L. De Winter (kiu mirinde debutis), L. Vinck (kiu krome prizorgis la belaspektajn programojn), A. Smet, E. van den Neste (nova lernantino, kiun oni varme aplaudis pro sia arta pianludo) kaj S-roj K. Ameryckx, F. Schellekens, W. Van Nereaux, A. Verhoeven kaj J. Verstraeten. Specialan mencion por S-ro P. Peelman kiu ne nur aktoris, sed ankaŭ kantis memverkitan kanton kaj prizorgis aŭ aranĝis la tekstojn de la skeĉoj. F-ino Cl. Peeters kiel kutime ĉe la piano prizorgis la muzikan parton kaj S-ro J. Montmirail per la „sondekoro“ kompletigis tiun ege ŝatatan vesperon.

La 4an de novembro dum la parolata ĵurnalo diversaj membroj kunlaboris per allogaj tekstoj kaj la 11an, pro la armistika tago, ne okazis kunveno.

La 18an estis aŭdigata pere de magnetofono radiofona teatraĵo „La Realeco estis tute alia“. Plenumis la diversajn rolojn: F-ino M. Ameryckx S-roj F. Schellekens kaj J. Verstraeten. S-ro J. Montmirail funkciis

kiel reĝisoro kaj aŭdigis la voĉon. La surrubandigo estis bone preparata kaj oni akiris plej taŭgan elsendaĵon. La sukceso iĝis vere „internacia“ ĉar ĉestis tiun kunvenon S-ro Prof-ro M. Fernandez Menendez el Montevideo, 2 japanaj maristoj: Takaŝi Kanai kaj amiko, kaj Ges-roj Jacobs kaj Castel, de la Brusela grupo.

La 25an S-ro Roger Jaumotte faris pri la „Trafikproblemoj“ paroladon ilustritan per lumbildoj. La paroladisto ekzamenis, en tre bela lingva stilo, la diversajn rimedojn kiujn oni elpensis en aliaj mondaj ĉefurboj por solvi tiun tre aktualan problemon. Sekvis varma aplaŭdo kaj dankvortoj de la Prezidanto. Dum tiu kunveno vizitis la grupon egiptaj samideanoj Gesinoroj Mohamed Joesef el Aleksandrio.

Marde, la 29an ± 40 membroj vizitis la artan folkloran pulĉinelan teatron „Poppenschouwburg Van Campen“ kaj travivis agrablajn horojn en bela atmosfero tipe antverpena.

La 2an de decembro pro la Sankta Nikolaa festo estis organizata lotumado, kiu alportis ne nur profiton sed precipe tiun sferon de la granda Sanktulo. Krom tio S-ro Maur. Jaumotte organizis tre amuzan vesperon, kiu havis tiom da sukceso ke oni daŭrigis la saman programon dum la kunveno de la 9a de decembro. Krome S-ino van den Neste, nova lernantino, havis la okazon legi tre lertan tekston memverkitan pri la korelativoj, post kio S-ino R. Lecat rakontis tre ŝatatan novelon de Georgo Clemenceau.

Programo de la venontaj kunsidoj:

Ĉiuvendrede en „Witte Leeuw“, Frankrijk, 4 je la 20,30a h. (la etaĝo)

Januaro: La 6an: Parolata ĵurnalo: la 13an: ĝenerala Jarkunsido; La 20an: Film-prezentado de S-ro R. Van Eynde „Gasparone“ kun Marika Röck kaj Johan Heesters; Dimanĉe, la 22an: je la 17a horo Jarfesteno en la Festsalono MAGNUS, A-venuo Prins Albert, 17, Berchem (ĉe Harmonie); la 27an: Kabareta Vespero kun diplomdisdono; lundon, la 30an: NOVA ELEMENTA KURSO.

Februaro: La 3an: Amuza Vespero; la 10an: en kunlaboro kun E.K.I. kaj, escepte, je la 20a horo: Parolado de S-ro W. De Schutter, ĵurnalisto, pri „KONGOLANDO“ kun koloritaj filmoj de la radio-redaktoro A. Van Kerckhoven (Ambau kunfari la

Por sia vintra provizo
 Por sia antracita karbo
 la Esperantistoj mendas
 ĉe **BELGOMINE**
 FRANKRIJKEI, 20
 ANTVERPENO
 kiu donas specialan premion

reĝan vojaĝon); Dimanĉon, la 12an: Karanavala Balo; Vendredon, la 17an: Parolado de F-ino H. Hofkens pri la libro „Batalo kontraŭ la pra-arbaro“ (kun lumbildoj); Lundon, la 20an: PERFEKTIGA KURSO; la 24an: Diskutvespero: „Avantaĝoj kaj malavantaĝoj de Reklamo (Enkonduko: S-ro R. Balleux).“

Nekrologo

La kruela sorto trafis nian bonan membron S-inon A. Bockholts pro la subita morto de ŝia kara edzo. Ni prezentas al ŝi, al S-ino Landerwijn, lia fratino, al S-ino H. Schoofs, lia onklino kaj al la aliaj familianoj niajn profundajn kondolencojn.

BRUĜO

Bruĝa Grupo Esperantista
(Poŝtĉeknumero: 4835.33)

La 22an de novembro portretludado gajigis la duan parton de la kunveno post la leciono de la elementa kurso, kiu estas daŭre sekvata de multaj fidelaj ĝelernantoj.

Amuza teatraĵeto estis legata dum la kunveno de la 29a; la diversaj kunludantoj plej bone antaŭlegis siajn rolojn kaj okazigis plurfoje tutkorajn ekridegojn.

S-ta Nikolao vizitis la kunvenon de 6-a de decembro. Kvankam oni ne vidis lin, oni povis admiri amason da pakajoj komplezeme alportitaj de la membroj kaj dislotitaj inter ili. La laborplena elvolvado de tiuj nekonataj premioj kun multaj surprizoj estigis plej entuziasman atmosferon.

La parolata gazeto de la 13-a de decembro entenis interesajn kronikojn de tri novaj ĝelernantoj: F-ino Wybouw pri „La kreo de la mondo laŭ Hinda fabelo“, S-ro Van Hecke pri „Laszlo filo, kaŭzo de la kaso Townsend“ kaj S-ro Behaeghel pri „Verkistoj kaj Esperanto“. La prezidanto per kelkaj vortoj rememorigis pri la naskiĝtago de D-ro Zamenhof kaj tiurilate artikolo pri la „15-a de decembro“ estis legata de alia novulino, F-ino De Mey. Lernado de nova kanto finis la vesperon.

Programo de la sekvontaj kunvenoj:

Ordinara kunveno ĉiutage je la 20a en sidejo „Gouden Hoorn — Cornet d'Or“ Simon Stevinplaats 2, Tel. No. 314.59:

Dum frosta nokto

Mirinde, vintro sorĉas florojn
 Milspecajn, densajn, senkoloroj
 Sur la fenestroj de la dom'.
 La prujno kovras nudajn branĉojn
 Ĝemantajn pro la ventaj tranĉoj
 Despota mano de l' sezono'.

Ho, sorĉe brilas neĝkristalo.
 Saluto el ĉielportalo.
 Ĉu eble eĉ angela larm'?

Ho, kiso por la virga tero
 La pura, blanka, neĝa ero
 En vero, estas pec' de ĉarm'

Orbrilaj steloj sur ĉielo
 Radias en la termalhelo
 Pendantaj sur la noktlazur'
 Juveloj de la firmamento,
 Vi, lumoj sur ĉieltegmento
 Mirakla via lumvelur'.

A. A. Leenhard.

Januaro, 3an: a) Ripetiga leciono; b) Disaŭdigo de diskoj. 10an: a) Dikto kaj korekto; b) Parolata gazeto. 17an: Ĝenerala jarkunsido, Raportoj, elekto de la komitato; 24an: a) Ekzameno pri legado; b) Kanta vespero. 31an: a) Skriba ekzameno; b) Priparolado de S-ro R. Lagast pri Radiostezio.

Februaro, 7an: a) Disdono de diplomoj; b) Triopa interparolado. 14an: a) Nova kurso. Ĉiu membro alkonduku almenaŭ unu novan lernanton. b) Interkonatiĝo inter la novaj ĝelernantoj kaj la aliaj ĝemembroj.

21an: a) Leciono; b) Disaŭdigo de diskoj. 25an: (Sabato) je la 21a en „Concordia“.

Dua vintra balo.
 Ĉiu rezervigu tiun daton kaj jam priparolu partoprenon kun familianoj kaj amikoj.

28an: a) Leciono; b) Portretludado.

Kondolencoj:

Al S-ro Léon VAN WASSENHOVE.

UEA-Oficejo

Ek de la 15-a de novembro ĝi estis transportita al nova adreso en Nederlando, nome:

**UEA, Eendrachtsweg 7,
 Rotterdam C.**

Ĉion, antaŭsenditan al Heronsgate, de nun direktu al la supra adreso.

Aliflanke oni bonvolu noti la novan adreson de la CENTRO DE ESPLO-RO KAJ DOKUMENTADO kaj de la ĜENERALA SEKRETARIEJO:

**77, Grasmere Avenue
 WEMBLEY - Medlesex
 (England)**

Ĉiuj leteroj, kiuj rilatas al informado, eksteraj rilatoj kaj la aliaj taskoj de la ĝenerala sekretario, estu sendataj al tiu ĉi adreso.

membro de la Bruĝa Grupo pro la morto de lia bofrato: S-ro Arthur BOCKHOLTS, kiu mortis en Antverpeno la 25-an de novembro.

BRUSELO

Esperantista Brusela Grupo
(Poŝtĉeknumero: 1230.48)

La 21an de novembro: S-ro Vander Stempel gvidis ĉiam same sperte la perfektigan kurson. Li pritraktis la ŝlosilvortojn „KIU, KIO, KIA“.

La 29an, tago de S-ino Weyn por la
(Sekvo sur paĝo 8)

LISTO DE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ

Antverpeno

J. in 't Duifken (S-ano Paesmans), Lge Koepoortstr. 64: Kostumoj (5 0/0 rab.)
Vino Max Bolsius, Diepestraat 58-60, Antverpeno: Kuirejilaro. Tel. 32.57.85
M. Philips, Karel Rogierstr. 1, Antverpeno: Korsetoj - Rab. 5-10% por la membroj.
P. van der Hoydonck-van den Buys, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg. ŝuoj — Tekstoj — Merceraĵoj. Tel. 74.27.86

J. Montmirail, Kortemarkstraat 53, Berchem. Arhitekto. Tel. 39.58.66
Morris de Ketelaere, Oostenstraat 25, Antverpeno. Hemiaĵoj. Tel. 39.17.09
S-ino Henny Jacques-de Ketelaere, Beeldekenstr. 31, Antverpeno. Privatoj lecionoj Tel. 33.75.38

Roger Jaumotte, Cyriel Buyssestr. 44, Antv. Anoncoj en tagĵurnaloj. Tel. 37.47.14
K. Amerijckx, Melgesdreef 40, Merksem. Centra Hejtado. Tel. 45.81.07
R. Vanistendael, Dambruggestraat 234, Antverpeno. Okulvitroj — Rab. 5 0/0
CL. Peeters, Onderwijsstraat 68, Antverpeno. Apotekejo. Tel. 35.40.67

L. Van Reybrouck, Venusstraat 33, Antverpeno: ĉiŝp. iloj por la hejmo. Tel. 32.43.88
Firmo van Iseghem & Verstraeten, St. Bernardse steenweg 631, Hoboken. Vitraĵoj — Speguloj — Tel. 37.88.20

J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Viandisto. Tel. 39.55.81
J. van Nereaux, Sterstraat 1, Antverpeno. Aŭtoĉar-ekspluado. Tel. 39.20.59
H. Peeters, Vordensteistr. 58, Schoten. Ingen.: Neon-lumo, Reklamoj. T. 81.48.47
H. Jacques, Lange Beeldekenstraat 31, Antverpeno. Presaĵoj. Tel. 33.75.38

Verdijck, St. Rochusstraat 174, Deurne. Ĉiaj asekuroj kaj hipotekejoj. Tel. 39.06.07
P. Peelman, Volkstraat 34, Antverpeno. Fumajoj — Pantofloj. Tel. 37.62.55
Y. Ameryckx, Helmstraat 154, Borgerhout. Peltaĵoj

M. Blajwas, Simonsstraat 40, Antverpeno. Frizisto. Tel. 32.13.18
S-ro A. van den Neste, Deurnebaan 30, Merksem. Presad-inkoj. Tel. 45.78.59

Bruĝo

Marcel Poupeye, Elf Julistr. 31. Ĉiaj asekuroj en la tuta lando. Tel. 371.93
Charcuterie Strovi, Vlamingstr. 48 (Teatroplaco) Viandvaro. Tel. 334.08
Maison Joye, Gelmutstr. 29. Ĉemizoj, Gantoj, Kravatoj. Tel. 332.75
Firmo G. Verbeke, spinolarei 19: Konstrumaterialoj. Specialaĵo: naturŝtono de Jura. Tel. 321.85

KOMERCISTOJ kiuj senkoste propagandas por Esperanto per reklamojn en siaj butikoj

G. Baeten, Belpairestraat 53, Berchem. Tel. 39.22.81. Frizisto por sinjorinoj
„De Boerinekens“ (Clem. Van Hassel). Estro de la trinkejo en la Flandra Operdomo
A. Roels, Montignystaat 155, Antverpeno. Ledaj artikloj-Selisto. Tel. 37.14.07

G. Goemaere, P. Genardstraat 39, Antverpeno. Speciejo, laktejo
Vandersmissen, Kampioenstr. 11, Antverpeno. Paperaĵoj, parfumaĵoj
Van Kerckhoven, Grote steenweg 63, Berchem. Fornoj; forĝaĵoj
R. Scheerdijk, Oude Vaartplaats 34, Antverpeno. Ŝnuroj; lignaj ŝuoj; lanternoj ĝardenilaro

Butiko Angora, (galerio), Huidevettersstr. Antverpeno. Luksaj pantofloj, sportŝuoj
Librejo Schuttershof, Schuttershofstr. 36, Antv.: luo, aĉeto, vendo de libroj
Vojaĝ-agentejo Pier Busseti, Hopland 5, Antv.: privataj kaj grupvojaĝoj

Bruselo

Farmacisto Jacobs, 94, rue général Eenens Bruxelles 3 15.26.01
Farmacisto N. Nellis, Meise 59.13.73
„BONBONS SWINNE“, 77, rue de Nieuwenhove 44.57.36
Imprimerie Liens, 18, rue de la Princesse 21.10.98
CARRELAGE „Carrart“, 19, avenue de Saxe 21.74.49
Viajn MEBLOJN ĉe S-ro Weyn, aĉetu rue Destouvelles, 57 15.96.97
Libroj, Publikajoj, ĵurnaloj, F-ino Kestens 24, rue Bodenbroeck 11.71.03
Tinkturejo, senmakuligejo „DEX“ 16, rue Esnest Laude 15.28.29

G. FAES

16, Schoenmarkt, 16
 ANTVERPENO

— Por via MUZIKO
 RADIO kaj GRAMOFONO

GENT La URBO de la estonta BENELUKSA KONGRESO

La urbo estas tre konata pro ĝiaj muzeoj kaj monumentoj.


La lastaj estas tiel multnombraj, ke la listo estas tro longa por malgranda artikolo.

Ni nur menciu ke pli ol 400 el ili

de sukerajo).

La trinkemuloj ne jaluzu: por ili estas „Potje dek” (kovrita poteto), tio estas ŝaŭmanta glaso da biero kovrita per malmola, seka kuko nomita „harde mastel.”

Ciu artamanto certe iros admiri la faman, konatan pentraĵon de la „Dia Ŝafido” en la ĉefpreĝejo; aliflanke, la folkloristo serĉos, en la tuja proksi-



De Duivel-Steen (La Diablo Ŝtono)

estas klasigitaj de la Reĝa Komisiono de Monumentoj. Inter ili estas religiaj, oficialaj burĝaj kaj privataj burĝaj konstruaĵoj.

Ili datumas el diversaj epokoj kaj do ankaŭ estas el malsamaj stiloj.

Dum promenado de du horoj estas eble vidi la plej ĉefajn monumentojn, ĉar ili troviĝas ĉiuj iom proksime unu de la alia.

La muzeoj povas kontentigi ĉiujn, ĉar estas ĉiuspecaj. Dum la Pentekostaj tagoj estos ankaŭ ebleco vidi la lumigadon de la monumentoj.

Kaj se, post promenado aŭ vizito al muzeo, vi malsatos, vi trovos en la restoracioj bonegajn manĝaĵojn.

Lokaj specialaĵoj estas „Gentse Waterzooi van Kip” (kokina supo kun multaj ingrediencoj) tre bongusta kaj nutriga manĝaĵo, kiu jam datumas de la mezepoko; estis, laŭ la legendo, la preferaĵo de Imperiestro Karolo.

Alia bongustaĵo estas la „Gentse Hutsepot”, miksaĵo de diversspecaj viandoj bolitaj kun diversaj legomoj precipe vintra manĝaĵo. Tre konataj estas ankaŭ la „Genta stufajo” (viando) kaj „rostitaj angiloj.”

Kiel frandaĵoj ekzistas: vafloj, „pekerkoek” (spickuko kun cinamo) — „speculaas” (cinamkukajo), „Gentse nokken” (ronda kuketo de faruno kun iropo) kaj „Katrienspekken” (speco

meco de la Grafa Kastelo, la plej maljunan vireton de Gent.

Ĉar samkiel Brussel, Gent havas „Manneken Pis”; tamen ĝi estas pli deca: ĝi ne akvumas la tutan tagon. Ĝia legendo reiras en la historio ĝis la fino de la 12a j.c.

GENT atendas vin je Pentekosto 1956.

La „Servisto”

De nia korespondanto S-ro K. Ruig, ni ricevis jenan informon, kiu certe interesos niajn legantojn.

Vizitante Svisujon, S-ro Ruig konatiĝis kun S-ro A. Pellanda, kiu estas direktoro de la laborejo „Winterthur” por blinduloj kaj invalidoj. Kvankam blinda S-ro Pellanda sukcesis konstrui balailon, kies stangon oni povas meti en ok diversajn poziciojn tiel, ke oni povas facile purigi diversajn lokojn, kiuj per rekta strango estas malfacile atingeblaj ekz. sub pezaj seĝoj, ŝrankoj, benkoj kaj anguletoj.

S-ro Pellanda jam petis pri patento rilate al la eltrovo donante la balailon la komercan markon „Servisto.”

Krome S-ro Pellanda estas kasisto de la kablovojo Intragna — Costa (en Ticino) kaj vera Esperantisto per kies helpo baldaŭ aperos esperantlingva broŝuro pri tiu kablovojo kaj pri belaj promenadoj en la alpa regiono de Costa.

Longludaj Diskoj pri Nuntempa Muziko kaj Popola Muziko

La Internacia Muzika Konsilantaro preparas du novajn seriojn de longludaj diskoj:

Antologion de Nuntempa Muziko kaj Mondan Kolekton de Popola Muziko. Ambaŭ serioj estos eldonitaj kun la helpo de UNESKO.

Por la Internacia Antologio estas elektitaj verkoj de elstaraj komponistoj el trideko da landoj, kies komponaĵoj ankoraŭ ne estis registritaj aŭ ne estis vaste prezentitaj en la disko-katalogoj ekster iliaj propraj landoj. La unua gramofondisko, dediĉita al la gvidaj komponistoj de Italujo kaj Francujo, enhavas la verkon „Simfonio n-ro 1” de la franca komponisto Henri Dutilleux kaj „Coro di Morti” de la itala komponisto Goffredo Petrassi.

En la nova kolekto de la Folkloro Muziko la kantoj kaj dancoj ne estos grupigitaj, kiel ĝis nun, laŭ la landoj, sed laŭ ilia rolo en la vivo de la popoloj: amkantoj kaj nuptaj kantoj, funebraj kantoj, laboraj kantoj ktp. Pli ol tridek landoj estos reprezentitaj: de Japanujo ĝis Aŭstrio, de Formoso ĝis Ukrainio, de Arktiko ĝis Etiopio. Por certigi aŭtentikecon de stilo, enhavo kaj interpretado, la registrado okazis en la loko mem de la origino. Ludis aŭtentikaj popolaj muzikistoj. Ambaŭ seriojn oni povas mendi ĉe: International Music Council. U.N.E.S.C.O. House, 19 Av. Kleber, Paris 16 Franclando.

(Laŭ UNESCO Features kaj UEA Informservo).

Koresponda Servo de Germana Esperanto-Junularo

La internacia korespondado estas la plej vasta aplikado de Esperanto. Ĝi kreas amikajn interrilatojn tutmondajn kaj tiel servas al la vera interkompreniĝo de la popoloj.

Por helpi al siaj membroj kaj al junaj komencantoj en Germanujo, ricevi amikojn en la tuta mondo, Germana Esperanto-Junularo (GEJ) fondiĝis Korespondan Servon, kiu kolektas adresojn de junaj (ĝis 25-jaraj) eksterlandaj samideanoj kaj disdonas ilin al samaĝaj germanaj korespondantoj.

GEJ petas ĉiujn junajn esperantistojn tutmondajn, kiuj deziras korespondi kun germanaj amikoj, skribi al la Koresponda Servo (adreso: S-ro Hans Best, Untere Mühlaustrasse 218, Mannheim, Germanujo) indikante siajn nomon, antaŭnomon, adreson, sekson, aĝon, profesion, lingvoscion esperantistan (komencanto aŭ progresinto) kaj interesojn, krome sekson, aĝon kaj profesion de la dezirata germana korespondanto.

Esperantistaj organizaĵoj estas invitatataj kunlabori kun la Koresponda Servo de GEJ.

TRA LA MONDO

Esperanto instruata en privata usona universitato.

Post longdaŭraj klopodoj nia samideano S. A. Klukowski sukcesis konvinki la estrojn de la koncernaj fakoj ĉe la Universitato Marquette en Milwaukee (Ŝtato Wisconsin) pri la edukala valoro de Esperanto, kun la rezulto, ke ili decidis aranĝi Esperanto-kursojn en la vesperaj lingvaj klasoj de la universitato.

La Universitato Marquette havas ĉ. 8000 gestudentojn kaj kredeble estas la unua granda, sendependa privata universitato, kiu enkondukis Esperanton en siaj klasoj.

Estos tre bone, ke oni sendu gratuleton aŭ poŝtkarton al D-ro James Byrne, direktoro de vesperaj klasoj, Universitato Marquette, Carpenter Hall, Milwaukee 3, Wis., Usono.

(Laŭ Heroldo 1.12.55).

ESPERANTO

en la lernoj de Slovenujo.

La Konsilantaro por Klerigo kaj Kulturo de la nacia respubliko Slovenujo (unu el la ses aŭtonomaj respublikoj de Jugoslavujo) en sia kunsido de la 23-a de oktobro 1955 principe aprobis la instruadon de Esperanto en la lernejoj de ĉiuj specoj. Kiel honorariata instruisto por la instruado de la lingvo povas esti enoficigata nur persono, kiu havas plenan mezlernejan edukon kaj la diplomon pri sukcese plenumita ekzameno C ĉe la Instituto por la internacia lingvo Esperanto. Escepton de ĉi tiu regulo povas doni nur la Konsilantaro por Klerigo kaj Kulturo de la nacia respubliko Slovenujo. Al la instruisto de Esperanto por la instruado en la lernejoj oni donos honorarion pohoran laŭ la regularo pri la honorariigo de la okupo en klerig-sciencia fako.

Laŭ ĉi tiu oficiala decido jam nun Esperanto estas instruota en kvin mezlernejoj, kvar porinstruistaj kaj dek ses fakaj lernejoj de Slovenujo al ĉ. 600 gelnantoj.

F. Novljan.
(Laŭ Heroldo 16.12.55 iom mallongigita).

KORESPONDADO

Dezirata korespondi jenajn gesamideojn:

S-ro Rehorek Milan (25 j.)
Emila Holuba 980
Náchoď I (Tjeĉo-Slovakio)
F-ino Blanka Seitlová
Jamborova 3
Brno XV (Tjeĉo-Slovakio)
F-ino Janinjo Rydlová
Koliskova 7
Brno XV (Tjeĉo-Slovakio)
S-ino Lea Bočková
Kamenna 9a
Brno (Tjeĉo-Slovakio)

Historio de Lumturo

Post ŝipvojaĝo de proksimume du horoj ni alvenas en la havenon de Terschelling.

Kio trafas nin tiom? La intimeco de la kaŭrantaj dometoj de la vilaĝo West-Terschelling? Ĉu la homamaso kiu eliras por „bootkiekje” (ŝiponrigardi)? Ne, ĉar eĉ jam kiam ni apenaŭ povis distingi la vilaĝon, io tiris niajn okulojn al si. Ĉu eble tiu kvadrata ava lumturo? Jes, ja eble Sed kial? Ĉu ankaŭ la aliaj nordfrisaj insuloj kaj multaj bordvilaĝoj ne posedas lumturon? Jes, certe, sed tiu-ĉi havas ion apartan, ion karakterdonan. La konstrumaniero estas por lumturo stranga, kaj ankaŭ la nomo „Brandaris”. Kiu lumturo havas propran historian nomon? Do Brandaris devas esti malnova turo? Jes kara leganto, ĝi estas la avo inter la lumturoj.

Jam en 1666a, kiam la angla ŝiparo sub gvido de Holmes detruis 150 komercajn ŝipojn en la markolo „Vlie” kaj poste alboriĝis en Terschelling kaj bruldetruis la tutan vilaĝon, jam staris forte Brandaris. Kaj ĝi rigardis la restaĵojn, ĉar oni bruligis 400 loĝdomojn, la plejparton de la komandordomoj kaj ĉiujn konservmagazenojn de la Unuiginta Orient-India Kompanio. Nur la Komunuma Domo, Brandaris kaj Nederlandreforma preĝejo restis. Antaŭ tiu tempo Terschelling estis unu el la plej gravaj transporthavenoj en Nederlando. Post tiu forta bato en 1666a la insulo neniam plu restariĝis. Nur kiel pilot-kaj refuĝhaveno ĝi havas ĝis nun signifon.

Sed, kara leganto, ke mi reiru al nia kara Brandaris, ĉar ĝi estas ankoraŭ pli aĝa. Jam sur geografia karto el 1541a troviĝas Brandaris. Ĝi nomiĝas laŭ la irlanda sanktulo Sankta Brandanus aŭ ankaŭ Sankta Brandarius.

Origine ĝi estis monaĥeja turo kaj la larĝa kvadrata turo estis tiam nur taggidmarko por la ŝipistoj. Baldaŭ oni bruligis sur ĝia tegmento fajron, kiu estiĝis poste oleolampo.

Al Brandaris apartenis preĝejeto kiun oni malkonstruis en 1594a. Jam en 1560a Brandaris ekruiniĝis. De Delwalstrand la maro fosis al si sulkon al la turo, pro kio oni timis ke Brandaris falos kaj oni pripensis konstrui novan turon pli enlanden. Tio ne okazis kaj en 1593a la ŝtatoj de Holando decidis riparon. Tiu riparo okazis en 1594a. Sed post 50 jaroj la ruiniĝo retrafis la Brandaris-lumturon kaj de mezo 17a jarcento ĝis 1837a ne brulis lumo sur Brandaris. Oni tiam bruligis fajrojn sur duno (Kooltjesduin) kiel pli ol jarcento antaŭe.

La 1an de Marto 1837a la ŝtato de Nederlando prenis sur sin la zorgon pri lumigado. Post tiu tempo la lumo pliboniĝis, ĝis kiam la 1an de Marto 1907a venis la elektra lumo, la fulmolumo. Kaj nun Brandaris havas du t.n. „Brandaris”-lambojn po 8000 kandelintenso. Lensoj plifortigas la lumon ĝis 3,6 milionoj da kandelintenso.

Unu tia Brandarislampo kostas pli ol f 200,— (preskaŭ \$ 53,—).

En 20 sekundoj la tuta lumigadsistemo kiu flosas sur hidrargo turniĝas 360 gradojn, kaj ĉiujn 5 sekundojn estas videbla po unu lumfasko. Tion oni nomas la karakteron de la lumturo, aŭ en maristaj terminoj: „Tiu fajreto donas unu en la kvin.” La lumo estas laŭ la lumlistoj de la ŝipado videbla je distanco de 19 marmejloj (= 35,2 km), sed tio dependas kompreneble de la alto super la marnivelo. Se ni surgrimpas la lumturon de Ymuiden (elp. ejmeŭden) aŭ la amsterdama „Westertoren” (okcidenta-turo), eĉ tiam ankoraŭ ni povas vidi en serena nokto la lumon de Brandaris (ĉ. 110 km).

La turo mem havas alton de 58 metroj, sed ĝi ne havas la plej grandan alton super la marnivelo, ĉar ĝi staras en dunvalo, meze en la vilaĝo. Antaŭe ĝi estis pli alta, sed oni forprenis la kapuĉon de ĝi dum la ruiniĝo. Nun anstataŭas ĝin la ruĝa vitra kupolo en kiu turnadas nokte la lumo.

En la tria etaĝo troviĝas birdomuzeo. „Strange”, vi diros, „kial ĝuste en lumturo?”

Mi klarigu.

Terschelling estas loko de birdkolonioj (Boschplaat kaj Noordsvaarder) kaj migrantaj birdoj ĉiam laŭiras la insulon dum sia flugado norden aŭ suden. Dum la noktoj, kiam Brandaris estas lumfonto en la nigro, multaj birdoj estas tirataj al tiu lumo kaj ili aŭ mortflugis kontraŭ la kupolon, aŭ ĉirkaŭflugadis la turon en la lumradioj ĝis kiam ili falis mortaj pro ellaciĝo. La turgardistoj trovis tiujn birdojn, kaj aranĝis ekspozicion en la vasta turo.

Ĉiajn birdojn oni trovos tie.

En 1909a oni fiksas sur la lumturon birdlatstablilon, por ke ili povu ripozi. Ĝi bone efikas.

En la kvina etaĝo estas la lumsisistemo kaj en la kvara la ĉambro de la turgardisto. Tie staras i.a. la radiotelefonaparato. Ni ĝuste aŭdas: „Halo lumturo Brandaris, halo Terschelling, jen Scheveningenradio, Scheveningenradio vin vokas, havas mesaĝon por vi, over!”

Ke ĉi tie iam psalmkantis monaĥoj!

K. Ruig.

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°

LA LOUVIERE

S.P.R.L.

Tel. n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtabuloj; KATOKULO, por signalvitroj.

(daŭrigo de paĝo 5)

amuzo vespero: Okazis tiam kuradoj ĉirkaŭ tabloj, miaŭoj kaj diversaj blekoj, diven-ludoj, kaj finiĝo per la Espero.

La 5an de Decembro: La fama „Parolata Ĵurnalo” interesis multajn el ni. La amuzo rakonto de S-ro Castel akiris la plej multon de poentoj.

La 12an, Zamenhofa Festo kun la partopreno de S-roj Jacobs, Castel, kaj Vander Stempel, por la seriozaj legadoj kaj muziko; S-ro Piron kantis kelkajn esperantajn kantojn kaj deklamis. Li ankaŭ dediĉis „Donu al mi monerojn” al nia punigistino, F-ino Kestens.

La 19an, perfektiga kurso kun nia bona profesoro Vander Stempel. La sekvo de la ŝlosilvortoj KIAM, KIOM, KIAL, KIEL, KIES, estis lia programo. Tre interesa vespero.

Programo de la venontaj kunsidoj

Januaro: (memorige): lundon, la 23an: Mozart-vespero: la 30an: JARKUNVENO.

Februaro: la 6an: Parolata ĵurnalo; la 13an: Parolado de S-ino Stern pri „César Franck kaj lia grupo”; la 20an: Perfektiga kurso; la 27an: Karnaval-vespero.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO en 1956

Vi scias, Kara Leganto, ke *Universala Esperanto-Asocio* estas la unu-sola esperantista organizaĵo internacia kiu sin okupas pri la progresigo de Esperanto. Kial vi do longtempe hezitis fariĝi aŭ resti ĝia efektiva apoganto, fariĝi aŭ resti INDIVIDUA MEMBRO DE U.E.A.: membro kiu ricevas la Jarlibron, aŭ, pli bone, membro-abonanto, kiu ricevas krom la Jarlibron, ankaŭ la monatan revuon ESPERANTO?

Kaj bonvolu pripensi, Kara Leganto, ke per TUJA aliĝo aŭ realiĝo vi certigas regulan, seninterrompan alsendon de Jarlibro kaj revuo, kiuj formas vin pri ĉio sciinda rilate la tutmondan movadon. Pripensu ankaŭ ke per TUJA aliĝo vi evitigas superfluan ekstran laboron administran al la Centra Oficejo kaj al via peranto.

Ne preterlasu do havigi jam nun vian kotizon por 1956 al Reĝa Belga Ligo Esperantista, pĉk. 1337.67 (Se-raing).

La kotizoj por 1956 estas: Membro kun jarlibro: Fr. 50; abonanto: Fr. 140; Subtenanto: Fr. 210; Patrono: Fr. 700; Dumviva: Fr. 2.800.

LA VOJO. La Grupo de Leeuwarden havis la bonan ideon, denove eldoni la jam delonge elĉerpitan kanton „LA VOJO”. La prezo estas po 0,25 nederlanda guldeno aŭ egalvaloro, ekskluzive de la afranko. Ĉe mendo de minimume 50 ekzemplerojn la mendinto ricevos 20 % da rabato. Mendojn kaj pagojn oni sendu al S-ro Y. P. Kingma, Koekoekstr. 8, Leeu-

warden, Nederlando, aŭ la pagojn en la ĝirkonton No. 3049 de la Amsterdamsche Bank, Leeuwarden, aldonante „por Frisa Esperantista Rondo.”

Ni vere gratulas nian sektion „Frisa Esperantista Rondo” pro ĉi tiu bele kaj klare presista reeldono de la konata kanto „LA VOJO” kun la muziknotoj. Nun, kiam la vintra sezono denove komenciĝas ni estas certaj en en multaj sekciaj kunvenoj oni de tempo al tempo volas iom kanti kaj kion pli bone povas tiucele uzi ol unu el la plej belaj kantoj de Zamenhof Tial ni tre esperas ke multaj sekcioj havigos al si minimume kelkajn ekzemplerojn.

Verdlando Vokas

Listo de radiodissendoj en aŭ pri Esperanto. Tempindiko: M.E.T. (= mezeŭropo tempo) valida ankaŭ en Belgujo, Nederlando kaj Svisujo.

Mallongigoj! m = metroj; kc/s = kilocikloj en sekundo; I = informoj; P = parolad(et)o; K = kurso; M = muziko.

LUNDE:

00.00—00.30 Bilbao (Hispanujo), 265 m, 1131 kc/s: I kaj P.
13.30—14.00 La Coruna (Hispanujo), 250 m, 1200 kc/s: P kaj K.
23.45—23.57 Hilversumo I, 402 m, 746 kc/s (en la 1-a kaj 3-a kvaronjaroj de 1956: Hilversum II, 298 m, 1004 kc/s), N.C.R.V.: P kaj M (nur la unuan lundon de ĉiu monato).

MARDE:

02.15—02.30 San José (Urugvajo), 192 m, 1562 kc/s: P.
12.55—13.00 Berno, 13,94 m, 21520 kc/s, 31,46 m, 9535 kc/s, 48,66 m, 6165 kc/s: P de d-ro Arthur Baur.
15.50—16.00 Ljubljano (Jugoslavujo), 327 m, 916 kc/s, 211 m, 1420 kc/s: K.
18.35—18.40 Berno, samaj ondlongoj, frekvencoj kaj P kiel 12.55.
19.15—19.30 Carlet (Hispanujo), 288 m, 1040 kc/s: I.
20.00—20.15 Radio Afrika en Tanger, 25,63 m, 11705 kc/s, 42 m, 7140 kc/s: P de la sveda sekcio de K.E.L.I. (Libera sveda kristana radio). (Nur la lastan mardon de ĉiu monato.)

MERKREDE:

16.30—16.40 Vieno II, 25 m, 12000 kc/s, 30 m, 10000 kc/s, 41 m, 7312 kc/s, 48 m, 6250 kc/s, 203 m, 1474 kc/s: P. (Nur ĉiu duasemajne: 14-XII k.t.p.)
18.55—19.10 Romo, 30,90 m, 9710 kc/s, 41,15 m, 7290 kc/s, 50,34 m, 5960 kc/s: P de Luigi Minnaja.
23.05—23.15 Vieno I, 25 m, 12000 kc/s, 49 m, 6122 kc/s, 513 m, 586 kc/s: I.
23.15—23.20 Hilversumo II, 298 m, 1004 kc/s (en la 1-a kaj 3-a kvaronjaroj de 1956 per Hilversumo I, 402 m, 746 kc/s), V.A.R.A.: I.

JAŬDE:

07.45—07.50 Perpignan-Rousillon, 202 m, 1483 kc/s: K.
09.30—09.40 Parizo, 348 m, 860 kc/s, 218 m, 1380 kc/s: K. de Pierre Delaire.
12.55—13.00 Berno, 13,94 m, 21520 kc/s, 31,46 m, 9535 kc/s, 48,66 m, 6165 kc/s: P de prof. d-ro Edmond Privat.
18.35—18.40 Berno, samaj ondlongoj, frekvencoj kaj P kiel 12.55.
23.30—24.00 Valencia, 200 m, 1500 kc/s: P kaj I.
23.45—24.00 Zagreb (Jugoslavujo), 264,7 m, 1133 kc/s: P, I kaj M.

VENDEDE:

02.15—02.30 San José (Urugvajo), 192 m, 1562 kc/s: P.
18.55—19.10 Romo, 30,90 m, 9710 kc/s, 41,50 m, 7290 kc/s, 50,34 m, 5960 kc/s: P de prof. d-ro Vincenzo Musella.
19.15—19.30 Carlet (Hispanujo), 288 m, 1040 kc/s: I.
22.30—22.45 Guatemala, 30,50 m, 9836 kc/s, 47 m, 6382 kc/s: I.

SABATE:

12.05—12.30 Rio de Janeiro, 214 m, 1400 kc/s: K kaj I.
18.30—19.00 Rio de Janeiro, 16,80 m, 17875 kc/s: K.
18.45—19.00 Barcelono (Hispanujo), 360 m, 832 kc/s: P.
23.15—23.25 Hilversumo I, 402 m, 746 kc/s, (en la 1-a kaj 3-a kvaronjaroj de 1956 per Hilversumo II, 298 m, 1004 kc/s), K.R.O.: Monata resumo (nur la lastan sabaton de ĉiu monato; la aliajn sabatojn: Katolikaj I de 23.15—23.22).